


ORGANO DE
ASTURA ESPERANTO ASOCIO

CATEDRA DE EXTENSION UNIVERSITARIA



UNIVERSIDAD de OVIEDO



GIJON

KONGRESI KAJ KONGRESUMI

Kiam mi partoprenas Esperanto-Kongreson kaj konstatas sintenon de multaj el tiuj, kiuj ĝin vizitas, mi ĉiam memoras pri tiuj virinoj, kiuj kutimas "butikumi" aŭ "trabutiki", t.e. kiuj vizitas butikojn ne por aĉeti, sed por ŝajnigi aĉetemon. Tiajn virinojn mi bone konas, ĉar ja mi mem iam dejoris kiel komizo ĉe vendejo. Ili alvenas en la plej maloportunaj momentoj, ĉefe kiam oni estas tuj fermonta la butikon; distras la komizojn el pli gravaj okupoj, samtempe plilongigante ties laborhoraron sen utilaj rezultoj.

En niaj Kongresoj ĉiam ekzistas personoj, kiuj ĝin vizitas nur turismcele, por sin distri, sen partopreni en la efektivaj kaj fruktodonaj laboroj, kiuj ja estas la progresiga faktoro de nia Movado. Tiaj personoj ŝajnigas esperantistemon, sed ili ja nur "kongresumas" tute ne "kongresas".

Jes. Mi bone komprenas kaj konsentas pri tio, ke tiel "butikoj", kiel "kongresoj", bezonas tiajn "klientojn", eĉ se nur propagandcele antaŭ la ekstera publiko. "Grava kaj interesa, nedubeble, estas tiu "butiko" (aŭ Kongreso), kiun vizitas tiom da personoj" - oni diras. Sed, ĉu ne estus pli utila al nia Movado <u>efektiva partopreno</u> de ĉiuj gekongresantoj en la laboroj de la koncerna Kongreso? Ĉu ne estus al ili mem pli utila tia partopreno, per kiu ili perfektiĝus en nia Lingvo?

ADONIS.-

SEPTEMBRO OKTOBRO 1982 | N° 28

NIA ANTENO

" ... L'espero, l'obstino kaj la pacienco -
Jen estas la signoj, per kies potenco... "

Kun espero, obstine kaj pacience, ni fosas nian sulkon. Kaj ni havas kaŭzon por iometa kontentigo, ĉar fruktojn, kvankam ne abunde, ni ja rikoltas.

Dum tri sinsekvaj semajnoj, en la monato Septembro, Radio Gijón disaŭdigis informojn de nia s-ano Julio Argüelles Garcia pri, respektive, Universala Kongreso en Antverpeno, Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj kaj Internacia Junulara Kongreso. La ĵurnaloj "Hoja del Lunes", preskaŭ ĉiusemajne, kaj "El Comercio", de tempo al tempo, publikigas artikolojn de S-ro. Sacramento Collado Llana pri kaj por Esperanto. "Radio Nacional en Asturias" informis pri komenco de Elementa Kurso de Esperanto en nia sidejo. Kaj la Regiona Centro de TVE dissendis intervjuon kun s-ano Adonis González Meana kaj komencon de la unua leciono de tiu Elementa Kurso.

Krom tiu menciita Elementa Kurso, kies malfermo okazis la 4-an de oktobro kaj estas gvidata de nia Prezidanto, s-ano Santiago Mulas Gallego, dum ĉi tiu oktobra monato komenciĝis jenaj kursoj: por-infana, en "Colegio Nacional Rey Pelayo"; elementaj, en "Formatik" (Lernejo por Stevardinoj) kaj ĉe "Gildo de Sangodonantoj". Kursgvidanto de tiuj tri lastaj estas nia nelacigebla s-ano Julio Argüelles Garcia. Ankaŭ progresiga kurso ekfunkciis, en nia sidejo, kies gvidanto estas s-ano Adonis González Meana.

= 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 =

Ĝis nun ni ĉiam baraktadis kontraŭ malhelpoj por sukcesigi eldonadon de ĉiu numero de nia modesta gazeto; sed, ekde ĉi tiu numero, kiun vi tenas en viaj manoj, tiaj malhelpoj malaperis, ĉar dank' al afableco de S-ro. Lliordén, Direktoro de la Katedro de Universitata Disvastigo, tiun eldonandon realigos la Universitato de Oviedo mem.

Ni esprimas nian sinceran dankon al S-ro Lliordén, kiu ĉiam estas preta malavare helpi nian Asocion.

ADONIS.-

0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0 = 0

HISPANUJO, LANDO DE INTELIGENTAJ HOMOJ

LA MONLUDO

Alvenis la fino de la jaro kaj komenciĝis la bilanco de la mortanta jaro.

Ĉiu homo, familio aŭ entrepreno analizas la sukcesojn aŭ fiaskojn de la jus finiĝanta jaro. Mi legis pri multaj bilancoj, tamen kiu vere vekis mian atenton estis tiu pri la monludo.Mi devas konfesi, ke mi ne memoras pri la ciferoj anoncitaj en tiu informo.La altaj instancoj de nia administracio prezentis laŭ sia kalkulo la bilancon pri la altiritaj profitoj dum la jaro.Evidente, oni parolis pri milionoj kaj milionoj da pesetoj. Tiuj milionoj estis akceptitaj -per malfermitaj brakoj, laŭ hispana esprimo - de la koncerna ministerio pri financoj.

Nia socio, kiu estas tiom òrtodoksa pri kiu ajn virto nenion diras rilate al la monludo, tute silentas kaj verŝajne ĝi kontentiĝas je tiu malvirto.Vero estas, ke oni ne laŭdas la monludon, sed ĝi ankaŭ ne estas malhelpata.

La novaj leĝoj, kiuj rajtigas la monludadon, ne multe parolas favore de niaj pliaj gvidantoj.

Nia tradicia loterio atingas sian pinton dum Kristnasko, sen forgesi, ke ĉiusemajne vi povas aventurigi vian monon por eble subita riĉiĝo, kvankam normale okazas, ke je la fino, ĉiu ludinto aŭ preskaŭ ĉiuj estis perdintoj, la rezonado estas simpla: la ŝtato "prenas" ĉirkaŭ la duonon sen riski eĉ centimon. La negoco ne estas rifuzinda kaj tiusence konstante ĝin oni disvastigas.

La futbalvetiloj estas pli modernaj kaj altiraj.Pli ol mil milionojn - da pesetoj ludas ni la hispanoj en tiu nova sistemo de tuja riĉiĝo.

Mi skribas, ni la hispanoj, ĉar - la subskribinto ankaŭ riskas sian monon, kvankam ege modeste kaj ĝis hodiaŭ ĉiam malsukcese.Klen iras la profitoj de tiu monludo ? Jen demando, kiun faras al si multaj hispanoj, kvankam - fidindan respondon neniu atendas.Kia - katastrofo, patrino mia, se ne ekzistus la futbalvetiloj, sendube eĉ la piedpilka sporto ne estus tiel interesa.

Ankoraŭ pli moderna, laŭ leĝa vidpunkto, estas la monludo en la kazinoj kaj la nomata bingo, kiu simple estas la tradicia loterio, kiun oni ludis hejme en familia rondo, kiel amuza tempopasigilo.Nuntempe tiu ludo estis teknike adaptita al la modernaj cirkonstancoj, ricevante la nomon " Bingon ".

Oni povus multe skribi pri la diversaj monludaj sistemoj, sed ĉi tie - oni ne celas libron, unike artikolon - de amatora skribisto destine al amika

rondo. Tamen io estas evidenta, ni hispanoj vidas la eblecon forigi la multajn ekonomiajn problemojn, kiuj ĉirkaŭas nin, pere de la monludo. Kia malfeliĉo rigardi la vivon ekde tiu vidpunkto !! Nia socio, kiu instigas nin al posedo de amaso da bagateloj, instigas nin ankaŭ al kiu ajn monludo.

Pli grave estas, ke miloj kaj miloj da hispanoj troviĝas en malbonaj vivkondiĉoj, ĉu pri senlaboreco, ĉu pro aliaj kaŭzoj, dum aliaj preferas dediĉi la monon por tiaj monludoj, anstataŭ solidare kaj kamaradece helpi la malfeliĉan samlandanojn. Sed ankoraŭ pli interesa estas la fakto, ke la hispanoj mem, kiuj suferas la sociajn diskriminaciojn opinias, ke unu el la plej taŭgaj rimedoj por eliri de tiu situacio estas dediĉi monsumeton por tiuj monludoj. Kion oni povas esperi, atendi de socio en kiu ĝiaj membroj fidas la estontecon al la hazardo de la monludo, anstataŭ la trankvileco de konstanta laboro, de normala vivo ? Sed ni, hispanoj estas tiamaniere.

Mi opinias, ke la hispano ne estas monludemulo. Estas la cirkonstancoj, kiuj vole aŭ ne vole devigas lin ludi sian monon. Kompreneble, la emo venas delonge ĉar la hispano ĉiam devis vivi ruze, pikareske kaj eĉ tiamaniere li estis kaj estas uzata en la laboro. Oni intencas kaŝi malvirton per alia malvirto. Estas tiom granda la fantazio, kiun enkapigas al ni nia sociordo, rilate al la monludo kaj precipe pere de la futbalvetiloj, ke ĉiu hispana pensas: se mi trafus futbalvetilon kun granda premio, mi aĉetus tion aŭ ion alian, mi helpus tiun kaj alian, ĉiam bedaŭre, nia vivo baziĝas hipoteze. Tio, evidente, ne favoras nin, nek nian socion, ĉar ni vivas for de la realeco.

Aparte je tio restas la konscia moro de la altaj landaj instancoj, kiuj instigas la civitanojn al la monludo. Ekde vidpunktoj etika, socia, kultura, eduka kaj humana, ĝi jam estas grava atenco al la homa digno. La afero estas simpla, la monludo estas malvirto kaj neniel oni povas defendi tiun trompon.

Ĉu povas funkcii socio, kies parto el ĝia buĝeto dependas de la monludo ? Kion oni povas pensi de socio, kies unu el ĝiaj financaj kolumnoj baziĝas ruze alpreni la monon de siaj regatoj ? Kion oni povas pensi de socio, kiu tiom protektas la monludon, per forigo de impostoj, konkrete pri la mono gajnita en la loterio aŭ per la futbalvetiloj ?

Evidente, ne al la monludoj, kiu ajn ĝi estos. Ni devas vivi en socio, kiu donos al ni, pere de racia laboro, ĉion necesan por ĉiu la vivon normalan, non luksoj nek kapricoj. Oni ne povas vivi sub la hazarda bona ŝanco de tiu aŭ alia monludo. Vi eble povos aludi, ke konscia homo neniam fidos je tiu sorto, sed neniu povas nei, ke ĉiu hispano - kaj mi skribas ĉiuj - iam pensis, ke la bona sorto, en kiu ajn monludo estas pli profitdona ol kiu ajn laboro, kaj sur tiuj premisoj nenia socio povos bone funkcii.

Restas ankoraŭ ne menciita, tiu monludo nomata borsa ludo, kiu sendiskute estas tio, monludo kaj iufoje estas vera katastrofo por la nacia ekonomio, laŭ kaprice de iuj sinjoroj.

Evidentiĝas la inteligenteco de ni, hispanoj. Vi kara leganto ja povas ridi aŭ plori, tio nur dependas de vi.

LUIS SERRANO PEREZ - SABADELL -

G R E G U E R I A S

.Ĉiu ajn vorto estas provizita per nemanĝebla kerno – per sia etimologio.

.Remiloj estas cilioj de larko.

.En sonĝoj de kalvulo malestas ombro.

.Tia estas la virino : ŝtrumpoj ne povas faldiĝi, tamen longaj gantoj – jes.

.Frenezuloj estas tiuj, kiuj eltrovis la artifikon, por ne devi pensi.

.Elektro konsistigas la parton de nerva sistemo de Di-Sinjoro.

.Superforte brufermante la pordon, oni pritranĉas la fingrojn de silento.

.Ni ne ĝuas konvene la kanton de najtingalo, ĉar ni ĉiam dubas, ĉu efektive temas ĉi momente pri kantata najtingalo.

.Ananaso estas indiano alivestita kiel frukto.

.Diferenco inter nimfoj kaj sirenoj konsistas en tio, ke nimfoj havas kisojn dolĉaj , dum sirenoj salitaj.

.Kelkafoje muzikistoj ne alrigardas kapelestron, kiu tiam direktas efektive la rigardojn de aŭskultantaro.

.Estas virinoj, kiuj enrigardas al viro en okulojn tiamaniere, kvazaŭ serĉante en li internan plafonon.

.Urbon refreŝigas nur malbone fermiĝemaj kranoj.

.Tondro estas konsiderinde vivaĝa tamburisto veniĝita de aŭdosento.

.Trajno-ekfajfo servas por dissemi melankolion sur plugkamparo.

.Tiu, kiu elsaltas el deksepa etaĝo, ne estas memmortigonto, sed aviadisto.

.Japanoj kun surnazigitaj okulvitroj pensigas onin pri io rano-simila.

.Certamomente astronomo sub granda teleskopo ŝanĝiĝas en mikrobon sub mikroskopo de la luno ; de la luno, kiu kliniĝas, por observi la koncernan astronomon.

.Broso estas onikso, centpiedulo – kiu ĉiam eskapas al loko, kie ĝi devas sin trovi.

.Kelkafoje tranĉilo ĉe distranĉado de librofolioj rezistas antaŭeniĝon, ĉar ĝi efektive ĉi-momente trafis nedistranĉeblan romano-nodon.

.En krajono-demordaĵo postrestis plej bonaj konceptoj.

.Pririgardi vespere vendej-fermadon, estas pririgardi, kiel oni gilotinas la tagon.

.Stratoj estas plilongaj nokte ol dumtage.

.Se ne ekzistus meridiano-reto, tiukaze la terglobo malsuprenfalus en abismon el sur la ĉielo.

O = O = O = O = O = O = O = O = O = O

Verkisto:Ramón Gómez de la Serna ; Tradukisto:E.Dembski ; Kompilis: S.Collado

KUIRANTE KUN PILAR

KAŜTANA SUPO

INGREDIENCOJ: 1 kg. da kaŝtanoj.
50 g. da grasa lardo.
120 g. da bovidaĵo.
120 g. da kokidaĵo.
90 g. da cepo.
60 g. da karoto.
1 laŭra folio.
2 l. da akvo kun bovidaĵa ekstrakto.
½ tekulero da sukero.
Salo.
Pipro.

En bakforno rostu la kaŝtanoj ĝis oni povas ilin sen ŝeligi.Metu ilin en kaserolon kun laŭra folio, 1 l. da akvo kun ekstrakto de bovidaĵo aŭ buljono kaj kuiru ĝis la kaŝtanoj estu molaj.En aparta kaserolo stufu la lardon,bovidaĵon, kokidaĵon, cepon, karoton, salon kaj pipron dum 20 minutoj, aŭ ĝis kiam la viandoj estu tute brunigitaj.

Kirlu de tempo al tempo, por malebligi bruldifekton, Aldonu la restantan ekstrakton aŭ buljonon, kuiru dum 30 minutoj, sen kovrilo.Aldonu la viandmiksaĵon al la molaj kaŝtanoj kaj kuiretu ankoraŭ dum 20 minutoj.Elprenu la viandojn, legomojn kaj frotu la supon tra kaĉigilo.

Aldonu, laŭdezire, sukeron kaj kirlu bone.

BONAN APETITON !

Perletera Amikeco

ADRESARO DE ESPERANTA GRUPO EL KUBO

1) Lourdes Rivero del Risco
Juan Canino, 66
Cascorro-Camagüey
(Dommastrino)

2) Omar Pérez Feijóo
Oscar Primelles, 12
Cascorro-Camagüey
(Teknikisto)

3) Teobaldo Aragón Rodríguez
Agramonte, 60 Guáimaro
Camagüey
(Sindikat-gvidanto)

4) Maura Rodríguez Rodríguez
Honorato Castillo, 23 A
Cascorro-Camagüey
(Inst-ino en elem.lernejo)

5) María Liria Cisneros
Juan Canino, 100
Cascorro-Camagüey
(Dommastrino)

6) Elena Liria Jiménez
Maceo, 79
Cascorro-Camagüey
(Studentino)

7) Ana Benítez Tait
Benito Morell, 28
e/Gabriel García y M.Gómez
Guáimaro-Camagüey
(Kuracistino)

8) Neicy Galindo Torres
Maceo, 173
e/Pedro Vega y N.Lapinet
Cascorro-Camagüey
(Prof-ino pri Fiziko)

9) Leonel González Mendoza
Ana Betancourt, 67
e/Martí y Benito Morell
Guáimaro-Camagüey
(Prof-ro pri Kemio)

10) María Julia Gutiérrez Alexander
Carr.Central, 34
e/Honorato Castillo y O.Primelles
Cascorro-Camagüey
(Prof-ino pri Geografio)

11) Ignacio Reyes González
Edificio 19, Apto. 8
Comunidad Palo Seco
Guáimaro-Camagüey
(Prof-ro pri Filozofio)

12) Hermidelio Galindo Súarez
Comandante Arteaga, 44
e/N.Lapinet y Despoblado
Cascorro-Camagüey
(Inst.en elementa lernejo)

13) Eusebio Cervantes Rodríguez
Edif. E-14-1, Apto.8,Casa 1
e/B y C,Microdistrito
Guáimaro-Camagüey
(Teknikisto)

14) Onel Rosales Matos
Juan Canino,Duplex nº1,Apto 3
e/O.Primelles y Carr.Central
Cascorro-Camagüey
(Inĝeniero)

15) Danilo Fontanilla Mendoza
Pepito Tey, 68
e/G.García y Victoria
Guáimaro-Camagüey
(Prof-ro pri Matematiko)

16) Pedro Portuondo Rivero
Las Flores, 51
e/Benito Morell y M.Díaz
Guáimaro-Camagüey
(Prof-ro pri Geografio)

17) Esteban Rodríguez Machado
Braulio Peña, 27
e/Ana Betancourt y E.Avila
Guáimaro-Camagüey
(Prof-ro pri Matematiko)

18) Mirtha Valdéz Pérez
Duplex, 3 Apartamento 1
e/Carr.Central y J.Canino
Cascorro-Camagüey
(Vendistino)

19) Nancy Bueno Campos
Duplex, 3 Apto. 3
Carr.Central Oeste
Cascorro-Camagüey
(Oficistino)

Ĉiuj estas junuloj.Deziras interŝanĝi poŝtmarkoj, bildkartoj kaj aliaj donacoj.

DISTROJ

Supo de literoj

E	R	I	N	A	C	O	E
G	E	M	O	I	N	M	E
E	T	O	G	E	O	A	N
N	J	A	L	U	Z	Ĉ	A
O	D	A	Z	I	F	O	D
T	B	R	A	K	O	N	O
O	K	O	F	C	S	E	R
T	I	N	O	L	U	K	O

Tiu ĉi kvadrato plena de literoj enhavas ses nomojn de mamuloj. Serĉu ilin!
Por tio vi povas legi horizontale, vertikale kaj eĉ diagonale - en ambaŭ direktoj sed ne transsaltu literojn.

Movoj de kavaliro

RI	ES	GAS	NO
RE	FI	NO,	NA
MAL	VI	TAS	KI
LA	E	BO	★

Komencante - per la silabo K I (nigreta), kaj laŭ la kavalira movo en la ŝakludo, trovu konatan proverbon.

SOLVOJ AL LA ANTAŬAJ ENIGMOJ

MOVO DE KAVALIRO:

Kien kudrilo iras,
tien fadenon ĝi tiras.


HIEROGLIFOJ:

1) Ĉe valo.
2) Sendu dek (sen du, dek).


Nombro da egalaj pentagonoj: 11

O	R	E	L	A	G	O	L
A	O	N	S	U	L	F	I
[illegible]	O	T	A	T	[illegible]	K	O	S
O	E	S	[illegible]	I	A	[illegible]	S
[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	F	[illegible]	A
C	[illegible]	[illegible]	[illegible]	[illegible]	E	[illegible]	F
[illegible]	I	L	E	D	E	[illegible]	M
O	N	S	T	R	E	[illegible]	A





Hieroglifoj






Kion ŝi alportas en la kolo? Se vi ne zorgas......

KRADOENIGMO

A B C Ĉ D

1 2 3 4 5



HORIZONTALE 1) Demanda adverbo kun la signifo "en kiu loko" ? Demanda neŭtra pronomo, por demandi pri afero aŭ besto. 2) Rigardejo, konsistanta el teraso, plejofte kun tegmento, ĉe la supra parto de konstruaĵo. Duparte dividita. 3) Malnoviĝinta kaj ne plu en uzado (precipe parolante pri vorto, esprimo). 4) Haŭta envolvaĵo de la testikoj. Nerealigebla idealo, teorio, projekto. 5) Infuzio. Pronomo.

VERTIKALE A) La plej malgranda leporhundo. Malnova unuo de termezurado, kiu valoras en Francio, ĉ 80, en Anglujo ĉ 40 kaj en Germanujo ĉ 55 arojn. B) Periodo, dum kiu io interrompiĝas. C) Konjukcio, kun la signifo "plie, aldone", uzata por ligi du samfunkciajn elementojn de la parolo. Ĉ) Malgranda velocipedo kun du egalaj radoj. D) Duelektroda tubo elektrona. Mamulo el la ordo de primatoj, kun antaŭen rigardantaj okuloj kaj reduktitaj dikfingroj; plej simila al la homo, tre lertmova kaj inteligenta.